Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**27-a de aŭgusto 2021, numero 20**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Virtuala Kongreso de IKUE, 14 – 21 de aŭgusto 2021

Marija Belošević,
prezidantino de IKUE

La Virtuala Kongreso de IKUE okazis ĉe la platformo Zoom inter la 14-a kaj 21-a de aŭgusto, t.e. inter la festotagoj de du ĉielaj patronoj de IKUE, S-ta Maksimiliano Kolbe kaj S-ta Pio la 10-a, papo. La ĉiutaga programo estis oficiale kvinhora, sed plurfoje oni restis en la agrabla diskuto.

Al la kongreso aliĝis sepdeko da esperantistoj el 22 landoj (Aŭstrio, Benino, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kongo, Koreio, Kroatio, Kubo, Pollando, Rumanio. Slovenio, Svislando, Ukrainio) inter kiuj sesdeko aktive partoprenis (pluraj eĉ de la ripozlokoj aŭ de vojaĝoj).

La ĉiutagaj programoj komenciĝis per meditoj kaj muzika rondo kaj finiĝis per la komuna preĝo de la rozario.

Dum la unua tago oni aparte memoris la Esperanto-Martirojn, inter kiuj Sanktan Maksimilianon Kolbe, patronon de IKUE (80 jaroj de la morto) kaj sac. Joan Font i Giralt, prezidanton de IKUE (85-jaroj de la morto). Oni ankaŭ diskutis pri la patronoj de IKUE, kaj konkludis ke necesas doni pli da atento al ekkono de iliaj vivo kaj verko.

La kongreso estis okazo ankaŭ memori pri iamaj prezidantoj de IKUE Jacques Tuinder (10 jaroj de la morto) kaj Antonio De Salvo kiu mortis ĉi-jare.

La temo "IKUE: hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ" estis okazo prikonsciiĝi pri IKUE kiel asocio kun pli ol centjara historio, kiu dum sia historio havis plurajn turbulentajn periodojn. Oni pridiskutis diversajn demandojn kaj problemojn de la nuntempa agado de IKUE (internacia kaj de la sekcioj) kaj kiel plej rapide provi solvi ilin. La fina diskuto pri tiu temo estis ligita al "Mi kaj IKUE": Kion ĝi signifas por mi; kial mi membras aŭ deziras membriĝi? Kion mi ricevis de IKUE? Kion IKUE povos fari por mi (kion IKUE alportis al mi)? Kion mi povus doni al IKUE kaj al la katolika Esperanto-movado ĝenerale? Pluraj promesis ankaŭ skribe respondi, kaj oni esperas baldaŭ kompletigi la diskuton.

La kongreso donis eblon ekscii ion pli pri la Katolika Eklezio kaj agado de katolikaj esperantistoj en Koreio, pri defioj por la Eklezio en Kubo kaj pri la komenco de la Esperanto-movado en la ĉina urbo X'ian, kiu venis tie dank' al la katolika misiisto, esperantisto.

Krome, prezentiĝis gamo da aliaj interesaj temoj: instruado de la papo Francisko, historiaj (militaj spuroj, pripaca konscio), kulturaj (renovigo de la katedralo en Gemona del Friuli), tra la diskuto pri la graveco de la tempo (en pli larĝa senco), pri revoj kaj trafoj (kun aparta atentigo al la agado de IKUE), ĝis prelegoj kaj diskutoj pri la valoroj (konfido, kapableco, la "instruo" de *La Eta Princo*).

Aparta atento estis donita al la komunikiloj, kaj tiurilate kun granda atento oni sekvis la prelegon pri la religiaj temoj en Pola Radio/Pola RetRadio kaj pri la historio de Radio Vatikana, ĝenerale. Kaj aldone al tio, oni ja ankaŭ parolis pri Esperanto-komunikiloj de IKUE Espero Katolika, Esperanto-elsendo de Radio Vatikana, k.a. nuntempaj sociaj retejoj.

Dum la kongreso, IKUE faris plian elpaŝon: la prelego "Katolika agado per fotoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj" malfermis ege fruktodonan diskuton, el kiu jam rezultis klara konkludo, ke du organizoj IKUE kaj ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj) havas bonan bazon por kunlaboro. Ni anticipe ĝojas, ĉar ĝuste la arĥivado kaj historio estas la kampoj, pri kiuj oni ne tro atentis, ĉar la Esperanto-kristanan heredaĵon oni trovas dise tra la mondo.

Fine, ne malpli grave menciindas la fakto, ke la kongreso estis vera podio por sincera diskuto, sed same por prezento de personaj atestoj, ekz. pri la reve-

no al la sino de la Katolika Eklezio post plurjardekoj. Tiu temo produktis la ideon, ke IKUE dum venontaj monatoj aranĝu la diskutojn pri tiu temo, al kiu bonvenos la atestoj de espereble pliaj personoj.

La lasta temo traktita de la kongreso estas la memoro pri la patrono de IKUE, sankta Pio la 10-a, papo prezentita el la perspektivo de la loĝanto de lia naskiĝloko.

Dum la kongreso okazis ankaŭ kelkaj foto-ekspozicioj de la IKUE-anoj kaj aliaj esperantistoj el Kroatio kaj Slovenio, kaj koncertoj de Luis Obando kaj Jahir Cataño kaj Koruso Prismo, Jomart kaj Nataŝa kaj Perla Mielo.

Konklude, la kongresanoj esprimis ĝojon pro la okazigo de la Kongreso. Aparte oni ĝojas, ke la malsamaj horzonoj ne malebligis la partoprenon, pro kio oni aparte aprezis la partoprenon de la koreaj esperantistoj.

En la finaj vortoj, oni esprimis dankon al la Dio pri la eblo dum ĉi tiu netrankvila tempo pliriĉiĝi sin spirite kaj fratece.

La komuneco kreita post la pasintjaraj Virtualaj tagoj, dum la lastaj monatoj pli fortiĝis, kaj jam de pluraj monatoj la katolikaj esperantistoj renkontiĝas ĉe la Platformo Zoom ĉiutage je la 20.15h, UTC+2 (informoj: ikue.reto@gmail.com).

# 1-a VERSo: Virtuala Esperanto-instruista Renkontiĝo de Sudameriko

**La temo:** Esperanto-instruado: antaŭ kaj post la pandemio

**Kiam?** La 28-an de aŭgusto, de la 16-a ĝis la 21-a horo UTC (13-a ĝis la 18-a horo laŭ Brazilja Horo).

Se vi instruis, instruas aŭ pensas iam instrui Esperanton, vi nepre partoprenu la unuan VERSon! (kiu ne estos la lasta; espereble ni faros multajn VERSojn formante belan poezion!)




## Kial Virtuala? Kaj kial Sudamerika?

Ĉar ni estas en nova epoko de la renkontiĝoj, esperantistoj el AERĴ (Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro), kiuj ĉiujare organizis ĉeestan renkontiĝon pri instruado, iniciatis virtualan renkontiĝon pro la pandemio, kaj invitis la reprezentantojn de ILEI kaj de aliaj sudamerikaj landoj.

## Kiel ĝi okazos?

La evento okazos per Zoom kaj ankaŭ estos vivelsendata al la jutuba kanalo de ILEI en Brazilo. Por ricevi ĝisdatajn informojn kaj la ligilon al la Zoom-ĉambro, plenigu la aliĝilon.

## La programo:

(Horoj laŭ UTC-3)

**13:00** – Malfermo (15 min)
**13:15** – Prelego 1 (45 min): Programo Mia Amiko (PMA), de Adonis Saliba, Brazilo – Daniel Cotarelo (Argentino)
**14:00** – Prelego 2 (45 min): La Friis-Metodo por retaj Esperanto-kursoj: Raporto pri eksperimento – Cícero Gabriel Soares kaj Izabel Andrade (Brazilo)
**14:45** – Muzika paŭzo (10 min): Grupo Nova Erao
**14:55** – Prelego 3 (45 min): Spertoj pri universitata Esperanto-instruado en Venezuelo antaŭ kaj dum la pandemio – Jesús R. Cedeño (Venezuelo)
**15:40** – Prelego 4 (45 min): Esperanto-kurso por Hispanparolantoj de Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) kaj la sperto pri instruado dum pandemio" – Jezer Dorante (Venezuelo)
**16:25** – Muzika paŭzo (10 min): Manno Montanna
**16:35** – Debato (75 min): Esperanto-instruado – antaŭ kaj post la pandemio – Gvidanto: Aristophio Alves Filho (Brazilo), Debatantoj: Ahmad Reza (Irano), Daniel Cotarelo (Argentino), Fernando Pita (Brazilo) kaj Renato Corsetti (Italio/Britio)
**17:50** – Fermo (10 min)

Sekvu la aranĝon:
https://eventaservo.org/e/1a-verso

# La 7-a Esperanto-staĝo en Métabief 15.08 – 21.08.2021

Liba Gabalda

La staĝo, organizita same kiel la lastan jaron, de la klubo "Esperanto Chalonnais" sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier, okazis meze de aŭgusto 2021 en la vilaĝo Métabief. Ĉar la koronvirusa pandemio daŭris kun pli rigoraj kondiĉoj, la partoprenantoj devis havi sanatestilon por havi permeson partopreni la aranĝon. Kunvenis 25 geesperantistoj, plejparte francoj el diversaj regionoj kaj unu geedza paro el Svislando. Bona ideo estis, ke ĉiu alportu ion el sia regiono. Do, dum la kafopaŭzoj ni povis ĝui diversajn frandaĵojn kaj aperitive ni gustumis plurajn sortimentojn de vinoj kaj fromaĝoj. Bongustis ankaŭ prunoj el nia ĝardeno. Ĉiutage ni bone kaj ĝissate manĝis.




Kiel kutime, matene kaj antaŭ la vespermanĝoj okazis Esperanto-kursoj. Michel Dechy instruis ĉefe pere de bild-rakontoj, bildoj kaj gazet-artikoloj. La lernantoj ŝatis roli en la aventuroj de Tinĉjo en Tibeto, la preferata albumo de Hergé mem. Li ankaŭ prezentis Esperanton en VTF (Vilaĝo, Turismo, Familio) antaŭ dudeko da gejunuloj kaj gepatroj. Ankaŭ pluraj esperantistoj ĉeestis la prelegon. La unuan vesperon li prezentis la verkon de Hergé, serion de 24 albumoj de la Aventuroj de Tinĉjo kaj Miluĉjo.

Jacqueline Poux instruis aparte al du virinoj, kiuj jam havis bazajn sciojn pri la lingvo, sed kiuj deziris perfektiĝi pri Esperanto.

La konversacian Esperanto-kurson gvidis Catherine Kremer. Ŝi mem priskribis la manieron prezenti sian kurson: Mi zorgis pri la kurso B. Mia rolo estis paroligi la partoprenantojn. En mia grupo ok interesatoj ĉeestis. Paroligi homojn ne ĉiam estas facile. La unuan tagon ni prezentis nin: kiu mi estas, de kie mi venas, kion mi ŝatas fari (hobiojn), kio estas mia profesio… Tre rapide la homoj interparolis. Mi tutsimple petis, ke ili prezentu al ni temon, kiun ili plej ŝatas. Kiu parolis pri kio: Max donis al ni pikardan recepton. Mi notis ĉion kaj provos fari ĝin hejme! Paŭlo prezentis al ni la metodon por krei ĉampanon. Belege! Ĉefe, ke li alportis ĉion (t.e. ĉampanon kaj rozkolorajn biskvitojn el "Reims") por ke ĉiuj profitu bonegan aperitivon! Thérèse parolis al ni pri sia infaneco rolante kiel "fratino Paŭlino". Christian rakontis al ni kiamaniere li transformis simplan urban ĝardenon en fruktodonan legomĝardenon. Ni nomis la diversajn ilojn, la legomojn ktp. Tre kortuŝa priskribo de "Constantine" en Alĝerio faris Jeanine helpate de Josiane. Ili vojaĝigis nin en aparta etoso. Unu rakontis, la alia desegnis la mapon de "La Roko" kun la pontoj ktp. Isabelle klarigis al ni, kial "Paray-Le-Morial" estas vojo al paradizo. Ŝi parolis al ni pri "Notre-Dame de Romay". Jean-Paul rakontis pri sia unua renkonto kun Esperanto. Bernard intervenis por paroli pri la projekto "Common Voice". Floreal kaj Liba alvenis iom pli poste. Liba kiel kutime fotis kaj Floreal fariĝis nia kontrolisto pri la bona uzo de kelkaj vortoj – ni ne plu bezonis vortaron! Mi vere dankas al la tuta grupo! Mi denove multe lernis dank' al ĉiuj kaj en agrabla etoso.

Post la tagmanĝo okazis piedmigradoj en la montaro Jura, vizitoj de la kastelo La Château de Joux, de mueleja muzeo, de distilejo en Pontarlier kun gustumado, de ekspozicio pri fabrikado de fromaĝoj kaj veturado per turisma trajno.




Vespere ni ludis tabloludojn kaj dancis. Dieter Rooke rememorigis la 100-jariĝon de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj Martine Demouy prezentis bildojn kaj rakontis pri vizito al la regiono de Fukuŝima kaj montris la domon de esperantistoj Jacugatake.

Ĉiuj estis kontentaj kaj tre feliĉaj povinte denove renkontiĝi kaj ĝui agrablan semajnon en tiu montara loko de ĵurasa regiono. Dankon al la organizantoj!

# 5-a Traduk-konkurso "Lucija Borčić"

Honore al Lucija Borčić (26.07.1921-14.11.2015) Kroata Esperantista Unuiĝo lanĉas la 5-an literaturan traduk-konkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto.

La konkursaj branĉoj estas jenaj:

- poezio: maksimuma longo ne fiksita
- prozo – rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj)

La rezultojn oni publike anoncos la 14-an de novembro en Zagrebo, okaze de la 6-a Memorkunveno al Lucija Borčić.



La organizantoj disdonos ĝis tri premiojn por branĉo. La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu esperantisto, kiu rajtas partopreni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj kiuj antaŭe ne estis publikigitaj ĉu en la presa, ĉu en reta, bloga, fejsbuka formoj.

Al la konkursaĵo oni nepre aldonu jenajn informojn:

- Personan nomon kaj familian nomon, poŝtan adreson, retadreson de la konkursanto;
- titolon de la originalo, personan nomon kaj familian nomon kaj la bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.

**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**
https://www.facebook.com/esperantorevuo

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso: hes@hes-keu.hr ĝis la 5-a de septembro 2021.

La premioj konsistas el diplomo.

La organizantoj de la konkurso prizorgos la presadon de la premiitaj tradukoj konforme al la reguloj preskribitaj por tiu agado (respekto de aŭtoraj rajtoj ktp).

# Foto-konkurso: Kroatio de via okulo 2

Kroata Esperantista Unuiĝo



Ĉu vi vizitis Kroation?
Ĉu vi havas interesa(j)n foto(j)?
Ĉu vi ŝatas kundividi ĝin (ilin) kaj eble eĉ gajni premion?

Se la respondoj estas *jes*, nepre partoprenu la konkurson!

Vi povas sendi maksimume 5 fotojn kiujn vi fotis iam ajn en Kroatio!
Do, ankaŭ malnovaj fotoj bonvenas!

Por ĉiu foto bv. aldoni la lokon kaj daton (almenaŭ jaron, se vi ne rememoras la daton).

Gravas nur, ke la fotoj estas viaj!

La limdato: 15-a de septembro 2021
Proklamo de la rezultoj: meze de novembro 2021

Fotojn sendu al: hes.keu@gmail.com




**Eventa Servo**
estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.